



2(170)
2019

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Stanisław Jaworski

trad. Lidia Ligęza

z tomiku **któřdy**

umierać z tęsknoty
najlepiej jest nad ranem
nic się już wtedy nie zdarzy
nie przyjdzie żaden list
nie zadzwoni telefon

trzeba przyjąć pozycję
umierającego
najlepiej na wznak
z rękami pod głową
byle nie zasnąć
z tęsknoty nie umiera się we śnie
dobrze jest cierpieć głośno
powtarzać jej imię

i patrzeć na zegarek
czy zamiast ze świata
nie pora zejść po bułki

las mówi do mnie
las mówi do mnie ciszą
najmocniej we śnie
jesteś ze mną
w dygotaniu liści
w każdym drgnieniu jest wszystko

w małym gniazdku wśród mchu
ukryłaś
swoją niepamięć

el volumo **tra kiu vojo**

morti pro la sopiro
la plej bone antaŭmatene
nenio jam tiam okazos
menos nenia letero
ne eksonos telefono

oni devas preni
pozon de la mortanto
la plej bone surdorse
kun la manoj sub la kapo
por nur nr ekdormi
pro la sopiro oni ne mortus dorme
bone estas suferi laŭte
ripeti ŝian nomon

kaj rigardi horloĝon
ĉu anstataŭ descendi de la mondo
ne estas tempo descendi pro bulkoj

arbaro parolas al mi
arbaro parolas al mi per silento
la plej forte en sonĝo
vi estas kun mi
en tremo de folioj
en ĉiu vibro estas ĉio

en eta esteto inter musko
vi kaŝis
vian malmemoron

Verdo – koloro de espero kaj ne nur

Verdo estas koloro, kiu havas multe da pozitivaj signifoj. Verda estis Edeno; verdo asocias kun vastaj spacoj, trankvilo kaj ripozo. Helaj, malvarmaj verdoj kvietigas la vidon. Verdo estas koloro de printempa, freŝa vegetalaro. Kiel koloro de ĉiujara renovigo de naturo ĝi fariĝis koloro de espero, longa vivo kaj senmorteco.

Verda vesto ornamita per floroj estis nupta vesto de fraŭlinoj el Jerusalemo. Ĝi certigadis al ili fekundon kaj geedzan feliĉon. Krome verdo gardis ilin kontraŭ malbonaj influoj de malamikaj personoj. Verdaj, amaraj herbaĵoj sur juda tablo simbolis alproksimiĝantan printempon kaj renovigon de la vivo.

Verdo ofte estis ŝatata kaj estimata koloro de dioj el diversaj mitologiaj sistemoj. En Egipto ĝi ligiĝis kun smeralda diino Iziso, Horuso kaj Oziriso. Dioj de Grekio, Afrodita, kiu naskiĝis el la celadona ondo, Atena, Apolono kaj Hermeso utiligadis verdkoloraj atributoj – laŭron, olivfruktojn, serpenton. Ne alie faris dioj de Nordo. Restis post tiaj ligoj la nomo de Irlando – la Smeralda Insulo kaj atributo uzata ĝis nun – trifolio.

Verdo en kristanismo estas liturgia koloro por la ordinara tago, esprimo de espero saviĝi, resurekti, venki morton kaj satanon. Ĝi estas ankaŭ signo de humileco kaj meditado, simbolo de Pentekosto (Verda Festo) rememoriganta eliron de Sankta Spirito al apostoloj. El tri ĉefaj virtoj Kredo, Espero kaj Amo sur bildoj – Espero havas verdan veston. Koloro palverda imagas bapton.

Sankta Johano en la Evangelio verkas, ke tronon de la Plej Alta Kreaĵo ĉirkaŭas ĉielarko simila al smeraldo. Probable de tiu imago devenas legendo pri Gralo, ujo, en kiu oni kolektis sangon de Kristo ĉe la krucumo. Ĝi estis el smeraldo aŭ verda kristalo.

La muzulmana standardo de Profeto kaj lia verda mantelo montras savon. Por loĝantoj de dezerto verdo devis asocii kun bildo de vivo kaj refreŝiga fonto de oazo. En islamo elpaŝas Hidr, verda homo el folioj, kiu rolas kiel profeto vizitanta la sonĝojn de tiu, kiu atingis la mistikan padon.

Wicca – dio de novpagana religio ankaŭ karakterizas per verda koloro.

Verdo estas koloro neŭtrala (lat. color medius), pera inter varmo kaj malvarmo, altaĵo kaj malaltaĵo, la ĉiela bluo kaj la infera ruĝo.

Alkemiistoj opiniis, ke la mistera fajro aŭ vivanta spirito aspektas kiel verda, diafana kristalo. Verda Leono kaj Verda Drako estis uzataj de ili substancoj povantaj dilui eĉ oron.

Astrologio ligas verdon kun astro Merkuro kaj persistemo.

Multaj multekostaj juveloj havas verdan koloron: smeraldo, jadeito, jaspiso, malakito, turkiso.

Verdo en literaturo substrekas freŝon kaj renaskiĝon de espero kaj energio.

De la XVI-a jarcento oni verdludis. Kiu ne havis verdan folion aŭ tigeon devis doni vetaĵon aŭ kison.

En ĉiutaga lingvo funkcias multe da diraĵoj utiligantaj verdon. Vorton "verda" ni uzadas por nematura homo aŭ frukto. La parolturno "havi verdon en la kapo" priskribas ventaniman, malsolidan, neseriozan homon. Ni ĉiuj scias kion signifas: transiri trans verda limo, verda karnavalo, verda lumo por iu aŭ io.

En niaj sonĝoj ulo en verda vesto montras, ke ni povos trovi helpon en niaj malfacilaĵoj. Se ni en la sonĝo troviĝas inter verdaĵo – baldaŭ en la familio naskiĝos infano aŭ venos iu, kiu fariĝos tre proksima. Sonĝo pri verdaj kreskaĵoj signifas, ke ni sukcese finos la edukon. Se ni ilin plantas – ni ricevos proponon de bona laboro.

Laŭ ne tro sciencaj observoj homoj, kiuj ŝatas verdon estas simpatiaj, glataj, evitantaj skandalojn, sed ŝatantaj klaĉi, kuraĝaj, sed prudente, bonaj amikoj kaj najbaroj komprenantaj ne nur proprajn problemojn.

Post tiu trarigardo de diversaj asociadoj rilate al verdo ni povas esti entute certaj, ke la verda koloro ne hazardo kaj trafe estis elektita por esperantaj standardo kaj stelo.

Lanugeto

La historio de mia hundo kaj mia, kun ĝia sorto kunligita, estas nur ŝajne malsimpla aŭ malfacila por kompreni. Ĝi portas en si mornan simplecon de la tempo, en kiu ĝi okazis. Tiujn, kiuj ĝin memoras, ne povas mirigi.

La milita bezono de rakontetoj por fortigi la korojn igis, ke oni rakontis ilin kun kavaleriana fanfaronado kaj ebruala manko de realecinto. Kaj mi, bedaŭrinde, ne toleras mensogojn. Precipe je la propra temo. Enuas min kaj turmentas falsado de la vero pro malmultekosta jovialeco.

Kaj historio de mia melhundeto Lanugeto tutcerte ne meritas ridon. Komenco de la rakonteto estas serena. Ĝi enhavas eĉ ecojn de la ŝajna komikeco. Temas nome pri tio, ke ankoraŭ antaŭ falo de Francio, mi decidis trovi propran ruzan rimedon por elrompiĝi el dratoj de la oflago.

Mi aliris nome al la konvinko, ke valoras elpensi al si hundon, la plej bone melhundon, danke al kiu ni fariĝos milda ridindaĵo de oflago, kaj antaŭ ĉio de ĝiaj gardistoj. Ĉi tiu mia melhundo el milde freneza fikcio subite translokiĝos en realecon, ĝoje malhumilan kaj malobeeman.

Kaj tiam iun tagon kaj en favoraj cirkonstancoj ĝi altiros sian sinjoron – dupulon kaj furiozulon – post pordegon de la oflago. Ĝi eltiros tiel forte, ke antaŭ ol gajigitaj gardistoj rekonsciiĝos, hundo malaperos, kaj mi laŭ vojo trans Belgio, Francio, Hispanio atingos finfine stiriloj de vera "Spitfire".

Mi misaprecis tamen forton, kun kiu la imago povas kolizii kontraŭ la realo, primoki ĝin, trompi tute nerespondece.

Kaj ke por ĉio oni pagas – mi pagis por mia pripenso multekoste kaj sale – ĉar larmoj kaj sango gustas sale.

Komence, mi ripetas, ĉio estis en ordo. Mi tremis post mi sur ŝnuro malnovan babuŝon. Al interesiĝitoj mi klarigis, ke ĝi estas simple longhara melhundo, sesmonata, hundido. Gaja, sed pli prefere mutanta kaj frenezeta.

Komenciĝis ridetoj, poste zorgemaj rigardoj, finfine la dezirata soleco. Kuracistoj konstatis leĝeran, subdepriman staton kun unu obstina imagaĵo.

Gardistoj kontraŭe, ridaĉis, ĝis al ili zonoj sur ventroj grincis. Estis tio laŭ mia penso. Sed – kiel mi menciis – mi misaprecis forton, kun kiu fikcio povas difekti dimensiojn de la videbla mondo. Sesmonata babuŝo, de momento, kiam mi nomis ĝin Lanugeto, komencis al mi melhundiĝi. Komenciĝis batalo pro Anglio.

Mia babuŝo do lante, lante ŝanĝiĝis en dekmonatan estaĵon kun rapida troto, kun hararo delikata kiel franĝoj de kaŝmira ŝalo kaj kun okuloj kiel du kuleretoj da mielo.

Neniu tion rimarkadis, sed tia estis VERO. Doloris min, ke neniu ĝin vidas kaj scipovas apreci belon de Lanugeto, ĝian fidelecon kaj mian korligiĝon.

Nur gardistoj ridaĉis plu kaj estro de la oflago forprenis al mi periode la honorajn rajtojn post kverelo kun majoro Brabancki pri intelekta supereco de ĉashundoj super ĉasistoj.

Lanugeto fariĝis pli kaj pli malkvieta. Eĉ kontumaca. Oni tiris ĝis post la pordego: perdrikoj en greno, leporoj sub limpado, vulpoj en arbaro.

Kaj efektive venis tia tago, kiam Lanugeto ektiris min subite post la pordegon, rekten en la grenon en birdan spuron. La gardisto ĉe la pordego ruliĝis pro la rido. Sed sur la turo staris kun karabeno la modela soldato kaj pafisto, malamanta hundojn gefrajtero Arnold Veicht. Komenco de lia serio disbatis la koron de Lanugeto. La hundo eĉ ne sciis, ke mortaĉas. Kaj mi ne fuĝis. Mi devis ja entombigi la hundon.

Kaj ke fino de la Veicht-serio disŝiris al mi la femuron, mi ankaŭ adiaŭis vespere la mondon, la homaron kaj oflagon pro la totala forfluo de la sango.

Mia koresponda amikeco kun Kayoko Takenaka el Japanio

Antaŭ kelkaj jaroj en nia krakova esperanta klubo okazis mia renkonto kun tri japanaj turistinoj. Tio ĉi estis belega evento dum nia ĉiusemajna kunveno.

Regis jam frua somera vetero, kiam nia amikino Granjo alkondukis de stacidomo tri japanaj virinoj vojaĝantaj tra okcidenta Eŭropo.

Ni interbabilis longe kaj amike. Ili prezentis mem al ni kiel ekskursita grupo vojaĝanta tra Eŭropo, volanta viziti ĉiujn esperantajn geamikojn, partoprenante en diversaj esperantaj aranĝoj. Iliaj nomoj estis: Kayoko, Akiko kaj Akemi.

Nia prezidantino de Krakova Societo Esperanto – Lidia instigis ĉiujn membrojn de la kunveno provi komenci korespondadon kun ekzotikaj personoj en universala lingvo Esperanto. Do mi prenis adreson de sinjorino Kayoko Takenaka volanta korespondi kun mi. Tio ĉi estis por mi granda koresponda aventuro, kiu daŭras ĝis nun. Ni reciproke skribis dum preskaŭ ok jaroj pri diversaj temoj; pri naciaj aspektoj de nia vivo. Mi ekkonis malnovan orientan kulturon de Japanio, kiun mi ekvidis sur ricevitaj diversaj belaj poŝtkartoj. Tio ĉi estas historiaj objektoj, precipe temploj de ŝintoisma religio. Kelkfoje mi ricevis fotojn de nacia simbolo de Japanio – monto Fugijama.

Mi interesiĝas pri malnova, orienta kulturo kaj tradiciaj kutimoj de tiu nacio, ekzemple pri festo de la floranta ĉerizarbo, dum kiu homamaso alvenas al parkoj admiri kaj flari aromantajn ĉerizflorojn.

Mi ricevis perletere specimenojn de materialoj el japana silko, el kiu oni kudras kutime virinaj kaj virajn kimonojn – tradiciajn festajn japanajn vestojn. Ili estas faritaj el silko aŭ kotono, ofte duflankaj, riĉe ornamitaj, portataj kun larĝa talia zono, lititaj de virinoj per granda kokardo dorsoflanke. Plezurdonantaj sinjorinoj gejoj vestiĝas en tre belaj silkaj kaj multekostaj kimonoj. Ili ankaŭ uzas tradicionan trikordan instrumenton ŝamisenon por ludi kaj amuzigi la riĉan societon.

Mia amikino Kayoko detale priskribis, kiel ŝi kudris kimonojn pro sia filino okaze de la nupta ceremonio. La kudrado daŭris preskaŭ unu jaron. Ŝi devis ornamati ĝin mane per brodaĵoj kun ora fadeno, precipe la vastan talian zonon nomatan "obi".

Mia korespondantino estas edziniĝinta virino kaj posedas du infanojn, filon kaj filinon. Antaŭ tri jaroj ŝia filino feliĉe edziniĝis kaj naskis filinon – unuan nepinon de avino Kayoko. Nuntempe ankaŭ ŝia filo estas jam edziniĝinta. Mi ekvidis ilin ĉiujn sur sendita familia foto.

Mia japanino estas ankaŭ bona vojaĝantino. Ŝi ekskursas ofte tra sia patrujo kune kun la amikinoj. Lastatempe mi ekkonis ŝian sekvan vojaĝon eksterlanden al Francio. Ŝi vojaĝis kun sia amikino Akemi. Ili estis invitataj tien de enamikiĝinta franca geedzparo por resti unu semajnon en suda, montara regiono de Francio. Tio ĉi estis revizito post estado de ĉi tiu paro en Japanio. Mi jam ricevis de tie belegan poŝtkarton kun amikaj bondeziroj.

Nun mi atendas vastan priskribon de tiu ĉi interesa vojaĝo en reto aŭ perletere. Mi admiras interesan, aktivan vivon de japanaj pensiulinoj.

Oni kutime diras, ke vojaĝoj edukas, sed mi opinias, ke interesa korespondado kun geamikoj ankaŭ povas multe instrui. Malgraŭ grandaj diferencoj inter niaj naciaj tradicioj la plenplena interkompreniĝo kun fora kulturo eblas.

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontoj marte 2019 j.

- 7. 03. 2019 j. – Grażyna Porada. **La socjeta flirto.**
- 14. 03. 2019 j. – Lidia Lięęza. **Verdo – koloro de espero kaj ne nur.**
- 21. 03. 2019 j. – Marta Michałowska. **Etrakonto de J. Broszkiewicz „Provo de la plej alta agnosko“.**
- 28. 03. 2019 j. – Grażyna Porada. **Esperantaj lingvaj ludoj.**